

La heroo vivo de Henri Dunant, 10-a parto Claude Gacond, 105-a radioprelego, 1964.12.02 & 05

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Claude Gacond raportas pri la heroo vivo de Henri Dunant. Vi aŭdas la dekan elsendon.

Junio 1859 finiĝas. En Bescia dekkvin mil litoj kaŝas la suferojn de dekkvin mil vunditoj. La urbeto fariĝis giganta hospitalo, kie cent kvardek kuracistoj provas ŝteli al la morto sardajn, francajn kaj eĉ malamikajn soldatojn. Henri Dunant sin trudis kiel estro de la civila volontularo. Lin famigis lia kuraĝa sinteno kaj lia stranga blanka koloniista kostumo.

Kiam hospitalestroj malpermesas viziti sian vunditaron, tiam Henri Dunant sentas sin kiel malhonorigita. Li trovas ĉiujn pretekstojn por sin trudi, kaj la malsanuloj, kiuj atendas lian viziton aklamas lian alvenon. Ili scias, ke tiu blanka homo disdonas tabakon kaj persone interesiĝas al iliaj suferoj.

Sciante sufiĉe bone la italan kaj germanan lingvojn nia blanka homo estas ofte vokata kiel interpretisto. Li devas kvietigi kverelojn, kiuj naskiĝas inter la Brescia-anoj kaj ties novaj okupantoj. Sed lia ĉefa zorgo estas por la aŭstria vunditoj, kiujn la kuracistoj tendencas neglekti.

La volontuloj ne ricevis sanitaran preparon. Pro tio ili rapide malkuraĝiĝas kaj forlasas sian taskon, kiam la vunditoj sin montras postulemaj. Tiam Henri Dunant revas pri alia volontularo, kiu estus preparita al tiu peniga tasko. Tiu volontularo, li opinias, devus esti oficiale agnoskita kaj de la armeestroj kaj de la registaroj. Dum li sin klinas sur mortantojn por noti iliajn lastajn familiajn dezirojn, dum li kuraĝigas soldatojn, kies gangrenitajn membrojn fortranĉas kirurgo, dum li postulas la rajton eniri ĉiun ajn malsanulejon, dum li sendas alvokajn leterojn al la ĝenevanoj, li imagas, kiel devus povi funkcii tiu volontularo. Novaj ideoj senĉese plibeligas lian revon. Li notas ilin dum la noktoj, ĉar skribi ideon permesas ĝin elprovi.

Henri Dunant imagas tiun volontularon laŭ tiu de la ĝeneva **Societo de la almozoj**. Lia deziro estas universaligi tiun societon kaj alvoki ĝin al la nobla tasko lukti kontraŭ la militoj, kaj kiam militoj tamen eksplodas, sukuri plej multe da homoj; soldatoj kaj civiluloj. Li prezentas senĉese tiun utopion al la kuracistoj kaj al la soldatestroj aŭ dum improvizitaj renkontiĝoj al la plej kuraĝaj volontularoj. Dum li argumentadas, novaj ideoj naskiĝas en lia cerbo.

La 3-an de julio Henri Dunant forlasas Brescia. Li akompanas trajnon da vunditaro, kiun atendas milanaj volontuloj. Nova urbo, nova bezono enfiltriĝi ĉien, por vidi kiel funkcias la sanitara sukuro kaj kiel la aŭstroj estas flegataj. Li admiras la agadon de sukura komitato, kiun perfekte prezidas grafino Verri-Boromeo. Jen pruvo, ke lia utopio povas esti realaĵo.

Ĉie oni parolas pri la agado de la blanka homo. La vunditoj rakontas pri li. Ili scias, ke se nun oni okupiĝas pri ili, tio estas ĉefe dank'al la instigo de la blanka homo. La milananoj salutas lin en la stratoj. La riĉuloj invitas lin por prezenti siajn ideojn en la salonoj. Sub lia influo, franco venonta por savi siajn sampatrianojn, akceptas dediĉi sian riĉaĵon al la flegado de la duonforlasitaj aŭstraj vunditoj.

La projekto de Societo por sanitara sukuro iom post iom formuliĝas pli klare. Ĝi interesas la gastojn de la salono de grafino Verri. Dum li rakontas antaŭ atentema publiko siajn impresojn pri Solferino, Castiglione kaj Brescia, la libro **Rememoro pri Solferino** anonciĝas. Li estas bonega oratoro, kiu kapablas ludi per siaj voĉo, fizionomio kaj gestoj. Post liaj prelegoj oni diskutas lian projekton. Unu vesperon oni parolas pri la dezirindeco de internacia insigno, kiu permesus rekonii la sukuristojn kaj kuracistojn. Subite iu proponas internacian flagon. Flirtante super la ambulancoj kaj malsanulejoj, ĝi alportus protekton ne nur al la sukuristoj kaj kuracistoj, sed ankaŭ simbolus la pacemon. Tuj la viroj protestas: por ili tio

La heroa vivo de Henri Dunant, 10-a parto
Claude Gacond, 105-a radioprelego, 1964.12.02 & 05

estas utopiaĵo. Kontraŭe la virinoj trovas tiun ideon realisma. Jen kiel naskiĝas iom post iom nova organismo.

Sed tiu laboro lacigas la blankan homon. Nerva tremado skuadas lian tutan korpon. Baldaŭ oni nomos lin verdulo, tiom lia haŭto palas. Liaj okuloj ŝvelas pro dormomanko kaj lia korpo tiom magras, ke la vestaĵoj ŝajnas aparteni al alia homo. Li devas ĉesigi tiun restadon en Milano, kvankam baldaŭ alvenos sukuristoj el Ĝenevo responde al liaj alvokoj.

En Ĝenevo li alvenas la 12-an de julio. Li subite rememoras pri la muelejoj Mons-Djémila, kaj dum li ripozas en alpa vilaĝo, li redaktas memorandon, kiu petas akvofalojn kaj terhektarojn por lia alĝeria societo. Tiu raporto estas unuanime akceptita de lia administra konsilantaro. Li estas petata ĝin prezenti al Napoleono la tria. Sed la angoro pri Solferino estas pli fortaj, ol la profesio. Dum vojaĝo en Parizo Henri Dunant pli propagandas por sia projekto de Societo de sukurista volontularo, ol por sia alĝeria kompanio.

Li vivas internan konflikton. Se li laboras por siaj muelejoj, lin senĉese alvokas la plendoj de la solferinaj vunditoj. Sed kiam li dediĉas sian tempon por tiuj vunditoj, tiam li vidas siajn alĝeriajn projektojn, kiujn ruiniĝas. Kion fari ? Ĉu forgesi la vunditojn por reveni al normala vivo de negocisto ? Tio ne eblas. Unue la vunditoj, poste la alĝeria kompanio. Jen lia elekto. Rezulto : La Ruĝa Kruco baldaŭ naskiĝos kaj la kompanio bankrotos.

Ni multobligos la tekston de tiuj elsendoj pri la heroa vivo de Henri Dunant kaj ĝin sendos al la petantoj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-